HAMBURG Esperanto

5/2004
Aŭgusto/Septembro

# Du meritaj membroj de HES

D-ro Werner Bormann

Elsbeth Wielgus Fotoj: Jürgen Wulff

La estraro de Hamburga Esperanto-Societo proponas al la membroj, distingi per la titolo Honora Membro du membrojn, Elsbeth Wielgus kaj d-ro Werner Bormann, pro ilia longa kaj fidela laboro por la Societo kaj la Esperanto-movado. Pri tiu propono decidu la membrokunveno la 16an de Septembro 2004. Bonvolu legi inviton en la programo!

| | |
|---|---|
| **Editoraĵoj**<br>Eldonanto: *Hamburga Esperanto-Societo* | **Jubilea jaro**<br>Pli ol duono de la jubilea jaro nun pasis. |

*r. a.*
Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg
Tel/Faks: +49 40 250 30 65

Prezidanto: *Jürgen Wulff*

Konstanta redaktoro: *Benno Klehr*

Retpoŝto: Esperanto-Hamburg

Kio ĝis nun okazis?
Werner Bormann dum pluraj vesperoj prelegis pri la pasintaj 40 jaroj en UEA kaj GEA el propraj spertoj. Krome li havis prelegon pri Zamenhof en ne-esperanta rondo.
En Aprilo la Hamburga Landa Ligo informis dum la Eŭropa Semajno sur la urbodoma placo. Ralph Glomp dufoje kantis kaj prezentis Esperanton sur scenejo. Gerhard Hein prelegis en diversaj lokoj pri eŭropaj temoj kaj lingvo-problemo.
La 8an de Majo okazis prov-leciono (Schnupperkurs) en la Esperanto-Domo.
La 19an de Majo HES invitis la membrojn al jubilea festo kun menuo kaj kantado.
BK

Redaktofino de
HAMBURG Esperanto
n-ro 6/04: 15-09-2004

**Sentenco**

Kantado
lavas la polvon
de ĉiutaga vivo
for de la animo.

N.N.

## Du und Deine Welt

La ekspozicio ĉi-jare okazos de la 27a de Aŭgusto ĝis la 5a de Septembro. Por la stando ni bezons **helpantojn**. Kutime ni dividas la tagojn al du skipoj: de la 10a ĝis la 14a kaj de la 14a ĝis la 18a. Bonvolu anonciĝi ĉe Benno Klehr aŭ Kerstin Baasch.

---

Liebe Mitglieder des Esperanto-Vereins Hamburg e.V.

Hiermit laden wir Sie herzlich ein
zu einer **außerordentlichen Mitgliederversammlung**

**am Donnerstag, dem 16. September 2004 um 20 Uhr** im Vereinshaus Klaus-Groth-Str. 95, 20535 Hamburg

Einziger Tagesordnungspunkt: Abstimmung der Mitglieder über den Vorschlag des Vorstands,

Dr. Werner Bormann und Elsbeth Wielgus

zu Ehrenmitgliedern zu ernennen.

Beide haben sich über Jahrzehnte unermüdlich für den Verein, für Hamburg und Esperanto eingesetzt. Wir meinen, dieses Engagement hat es verdient, nun auch auf diese Weise gewürdigt zu werden.

Die Abstimmung und die Ehrung soll im festlichen Rahmen erfolgen. Wir bitten Sie, möglichst zahlreich zu kommen.
Im voraus herzlichen Dank.

Im Namen des Vorstands

Jürgen Wulff

**Invito**
al eksterordinara membrokunveno de Hamburga Esperanto-Societo
Dato: 16a de Septembro 2004 • Tempo: 20.00 h
Sola punkto de la tagordo: Decido pri la distingigo de Elsbeth Wielgus kaj d-ro Werner Bormann per la titolo Honora Membro.

**El la vivo de *d-ro Werner Bormann***

Li naskiĝis 1931 en Berlin kaj eklernis Esperanton en aĝo de 17 jaroj. Li membriĝis en Hamburga Esperanto-Societo en 1961. En 1963 li transprenis la instrukomisionon en la Universitato de Hamburg pri Esperanto.
Prezidanto de HES kaj vicprezidanto de GEA li fariĝis en la jaro 1965. En 1966 li ne estis prezidanto de HES, ĉar li profesie troviĝis en la ĉefurbo Bonn. En 1967 li reelektiĝis kiel prezidanto de HES, fariĝis pezidanto de GEA (ĝis 1977) kaj direktoro de la Germana Esperanto-Instituto (ĝis 1992). En la sama jaro li aktiviĝis en UEA kiel revizoro por la UK en Rotterdam, dum kiu li fariĝis Komitatano de UEA.
En 1971 d-ro Werner Bormann fariĝis estrarano de UEA, en 1974 vicprezidanto, 1976 Membro de la Akademio kaj 1977 Ĝenerala Sekretario de UEA.
Post 1981 li daŭrigis sian laboron en Arbeitskreis kaj Societo por Internacia Lingvo, estis elektita Prezidanto de la Landa Ligo Hamburg de GEA en 1985 (ĝis 1993) kaj iniciatis la okazigon de la Germana Esperanto-Kongreso 1986 en Hamburg.
En 1987 li fariĝas Asociita Docento, de post 1993 li estas Plenrajta Docento de AIS (San Marino), ano de studgrupo pri interkompreniĝo de Eŭropa Parlamento kaj estrarano de Societo por Interlingvistiko.

Dum la pasintaj jardekoj d-ro Werner Bormann publikigis diversajn verkojn pri Esperanto ("Bona Ŝanco"), terminologio kaj ekonomio. Li prelegis en universitatoj kaj kongresoj, gvidis laborgrupojn kaj partoprenis en diskutoj - kaj daŭrigas tion ĝis hodiaŭ.

*Benno Klehr*

---

**Faktoj el la vivo de *Elsbeth Wielgus***

*Elsbeth Wielgus* estis naskita 1928 en Hamburg.
Kune kun sia fianĉo Heinrich Wielgus, la nuna edzo, ŝi eklernis Esperanton en 1948 en kurso de August Weide. Ili fariĝis membroj de Hamburga Esperanto-Societo kie ili baldaŭ estis elektitaj en la estraron.
Elsbeth Wielgus estis elektita prezidanto en 1971. Dum naŭ jaroj ŝi gvidis la estraron, kiu kuraĝis forlasi la gastejojn, kie kutime okazis la klubaj kunvenoj, kaj malfermi klubejon, kie la societo profitu el la konsumitaj trinkaĵoj. En 1976 ŝi komencis apud sia profesia laboro en oficejo kaj la estrara laboro, gvidi malgrandan gastronomion en la klubejo, kiun la societo povis lui en Hamburg-Langenfelde. En la jaro 1978, kiam la societo aĉetis la kluban domon, kiu troviĝas apud ŝia (ilia) loĝejo, ŝi transprenis eĉ pli

da respondeco. Pro la fakto, ke ŝi ne nur organizis la tutan domon, sed ankaŭ kuiris dum la Ĵaŭdaj klubvesperoj, dum festoj kaj semajnfinaj kursoj, ŝi iam estis nomita la "patrino" de la Esperanto-Domo. Ĝis 1998 ŝi perfekte organizis la kluban gastronomion, aĉetante kaj servante trinkaĵojn kaj manĝaĵojn. Intertempe pli junaj membroj transprenis la laborojn; tamen la "patrino" foje kontrolas...

*Benno Klehr*

---

**Veranstaltungen im Esperanto-Haus**

Wöchentlich werden Vorträge, Seminare und gesellige Veranstaltungen in Esperanto geboten. Ausländische Gäste machen das internationale Flair der Esperanto-Welt erfahrbar. Hier findet echte Völkerverständigung statt.
Das Klubhaus des Esperanto-Vereins Hamburg ist regelmäßig donnerstags ab 19:30 Uhr geöffnet. Das Programm beginnt ab 20:00 Uhr.

Außerdem finden im Klubhaus am Wochenende Seminare statt.
**Die freundlichen Räumlichkeiten können auch für private Feiern gemietet werden.**
Information: Tel. 040 - 68 91 58 91

---

**Nia programo**

| **Aŭgusto 2004** | **Septembro 2004** |
|---|---|
| **5** Vojaĝintoj raportas<br><br>**8** daŭriga kurso 11-17<br><br>**12** Video: **Koncerto de Bertil kaj Birke en NB**<br><br>**19** *Werner Bormann:* **Raportoj pri la kongreso en Ĉinio**<br><br>**26** *Werner Bormann:* **Esperanto ĉu vere planlingvo, ĉu ne prefere helplingvo?**<br><br>**29** daŭriga kurso 11-17 | **2** 18 h estrarkunsido<br>20 h Video:<br>Sciencstrategio por Esperanto *(Blanke)*<br><br>**9 Ludovespero**<br><br>**11 Schnupperkurs**<br><br>**16 Membrokunveno:** Decido pri la distingigo de Elsbeth Wielgus kaj d-ro Werner Bormann per la titolo Honora Membro.<br><br>**19** daŭriga kurso 11-17<br><br>**23** Video: ***Angoroj*** (Kriminalfilmo)<br><br>**19 Klubaj Aferoj** |
| **Die Bibliothek im Esperanto-Haus** | **Esperanto-Schnupperkurs** |

| | |
|---|---|
| Über 3000 Titel erwarten Sie in einer der größten Esperanto-Bibliotheken Deutschlands. Von der Bibel bis Böll, von Asterix bis Eco reicht das breite Angebot. Natürlich findet man auch Lehrmaterial und Wörterbcher. Mitglieder können sich kostenlos Bücher ausleihen. | Lernen Sie Esperanto unverbindlich kennen. Der inzwischen traditionelle Schnupperkurs erwartet Sie am 11. September von 14 - 17 Uhr im Esperanto-Haus. Probelektion, ausführliche Informationen, Kaffee und Kuchen und gute Laune erwarten Sie. Beitrag 10,- EUR.<br>Bonvenon kaj ĝis baldaŭ! |

---

**3a Finow-kanal-kunveno en Junio 2004**

La kunveno okazis denove en la belega naturamika domo proksime al la urbo Eberswalde.
Sabaton matene Benno Klehr agrable prezentis la historion de kanaloj. Li estis bone preparita.
Posttagmeze okazis ŝipveturado sur la Verbelin-Lago.
Dimanĉon ni vizitis la forstbotanikan ĝardenon en Ebersvaldeo.
La gvidanto estis d-ro Götz, scienca estro de la ĝardeno. Ni lernis multe pri plantoj kaj la historio de la tero ĝenerale.

*Hannelore Brunow*

---

**Germana Esperanto-Kongreso NB**

Neubrandenburg (NB) estas belega malgranda urbo, saĝe rekonstruita post al militaj detruoj.
*Werner Pfennig* bone gvidis nin. Ankaŭ la kongresejo estis tre bone elektita, kaj vere ekestis agrabla etoso. Tamen la jarĉefkunveno de GEA por mi ŝajnis iom stranga: Pri la laboro de la pasinta jaro oni ne aŭdis multe. La prelego de mgr. Baranowski pri la kongresa temo Pomerio estis sufiĉe teda. Tute alia klaso estis la prelego de T. Dahlenburg: sprita, klera kaj enhavoplena. La kulmino de la kongreso!

*Benno Klehr*

---

*Benno Klehr kaj Jürgen Wulff post la fiksado de la afiŝo*

*Delia Pick* en Eppendorf havas la eblecon, uzi la afiŝtabulon de la kulturdomo, kiu troviĝas antaŭ la grandmagazeno Karstadt.

La tabulo havas grandecon de 3 metroj oble 1,80. Jürgen Wulff kaj Volker Kraeft faris belan afiŝon por HES, kiu nun videblas tie.

| **Hamburga Vintro** | Post la sukcesa Hamburga Somero 2003 ni pro la 100jara jubileo okazigos Hamburgan Vintron de 3a ĝis la 5a de Decembro 2004. |
|---|---|

Re al Esperanto en Hamburg